

Eŭropa lingvopolitiko kaj Esperanto

Felix Zesch

Prezidanto de la Esperanto-Ligo Berlin

Estrarano de la Germana Esperanto-Asocio

Felix.Zesch@esperanto.de

@flxz

13a de januaro 2013 ĉe la Esperanto-skvadro de la piratpartio en Berlin



Sunmontaj gvidlinioj pri eŭropa lingvopolitiko

- Septembro 2010: Germana Esperanto-Asocio laborigas fakgrupon
- Junio 2011: Federacia membrokunveno voĉdonas por la gvidlinioj
- Maio 2012: [Germanlingva komento por la gvidlinioj](#) aperas en la reto

- Tri partoj
 - Ĝenerala lingvopolitiko
 - Esperanto en la Eŭropa Unio
 - Esperanto-instruado



Ĝenerala lingvopolitiko

1. Ni subtenas la multlingvecon.
2. Ni alcelas edukon, precipe de infanoj kaj junuloj, al respekto de ĉiuj lingvoj.
3. Ni subtenas iniciatojn por interkultura komunikado en Eŭropa kadro.
4. **Ni estas por lingvopolitiko, kiu ne kondukas al flankenŝovo de lingvoj.**
5. **Ni kontraŭas lingvan diskriminaciadon.**
6. **Ni instigas al EU-vasta interŝtata dialogo pri lingvopolitiko.**
7. Ni atentigas pri la konflikto inter la rekomendoj de EU rilate lingvojn kaj ties realigado en la membroŝtatoj.



Esperanto en la Eŭropa Unio

1. Ni atendas racie pravigitan sintenon pri Esperanto, precipe ankaŭ de fakuloj kaj politikistoj.
2. Nuntempe ni ne vidas senperan juran eblon, igi Esperanton unu el la oficialaj lingvoj de EU.
3. **Ni kredas, ke Esperanto povas subteni la ekiĝon de Eŭropa identeco.**
4. **Ni subtenas la ideon, kanti la Eŭropan himnon en Esperanto.**
5. La elprovo de Esperanto kiel laborlingvo en certaj organoj kaj instancoj de EU estas dezirinda.
6. La uzo de Esperanto kiel relaksa lingvo en la Eŭropa Parlamento havus avantaĝojn.



Ni kredas, ke Esperanto povas subteni la ekiĝon de Eŭropa identeco.

- Eŭropa identeco estas atinginda laŭ pluraj pintaj eŭropaj politikistoj kaj intelektualuloj.
- Homoj povas havi plurajn identecojn
 - Berlinano, Orientgermano, Bavaro, Germano, Eŭropano
- Obstaklo al komuna eŭropa identeco estas lingvoproblemoj.
- Lingvo estas identigilo
- Esperanto povus kontribui al eŭropa identeco.



Ni subtenas la ideon, kanti la eŭropan himnon en Esperanto

- Ekde 1985 la muziko de la „Odo al la ĝojo“ estas himno de la EU.
 - Sen vortoj en la „universala lingvo de muziko“
 - Komplemente al naciaj himnoj, ne anstataŭe
- Manko de vortoj esprimas lingvan problemon de EU
- Al la melodio de la „Odo al la Ĝojo“ oni kantu alternativan tekston en Esperanto
- Tradukoj servas nur por kompreni, ne por kanti
- Politikistoj kiel Jerzy Buzek (prezidinto de Eŭropa Parlamento) favoris tiun ideon

Tekstpropono por la Eŭropa Himno

*Kantu kune amikaro, ni la ĝojon festas nur,
nek rivero nek montaro plu landlimoj estas nun,
Ho Eŭropo, hejmo nia, tro daŭradis la divid',
Nun brilegu belo via, ĉiu estas via id'
Via flago kunfratigas homojn post milita temp',
Via leĝo nun kunigas civitanojn en konsent'.*

*De l' Malnova Kontinento, ĵus ekstaris la popol',
gvidas ĝin tre nova sento, kaj kuniga forta vol'.
Sub la ŝildo de la juro, ni vivados en konkord'
Tio estas nia ĵuro: unu land' kaj unu sort'.
Jen ekzemplo por la mondo, jen direkto, jen la voĵ'.
Tuthomaro granda rondo, en la paco, en la ĝoj'.*



Esperanto-instruado

1. Ni rekomendas Esperanton kiel propedeŭtikan instrumenton por subteni la lernadon de fremdaj lingvoj. La lernado de Esperanto plibonigas, kaj la akiron de pliaj lingvoj, kaj pli profundan enrigardon en la ĝeneralan funkcion de lingvo, ankaŭ de la propra gepatra lingvo.
2. Ni rekomendas al la Eŭropaj civitanoj, lerni Esperanton kiel unu el la du lingvoj, kies akiron rekomendas la Eŭropa Komisiono.
La propedeŭtika efiko de Esperanto povas tiam ebligi al la civitanoj la realan akiron de du aŭ pliaj fremdaj lingvoj.
3. Ni rekomendas, peri bazajn sciojn pri Esperanto en la lernejoj.
4. Ni rekomendas la enkondukon de Esperanto-instruado kiel fakultativan ofertan en lernejoj.
5. Ni rekomendas Esperanto-instruadon en universitatoj, ekzemple kadre de la Ĝeneralaj Studoj.
6. Ni rekomendas, trakti interlingvikon kaj Esperanton kiel studobjektojn en universitatoj.



Ni rekomendas Esperanton kiel propedeŭtikan instrumenton por subteni la lernadon de fremdaj lingvoj.

- Lingvo estas propedeŭtika, se ĝi helpas lerni aliajn lingvojn.
- La (mal-)sukceso pri lernado de la unua fremdlingvo ofte influas la ĝeneralan emon de homoj lerni lingvojn.
- Propedeŭtika instruo de Esperanto ne celas ĉefe la postan uzon de Esperanto, sed la preparon lerni aliajn fremdlingvojn.

